


SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1992:6



En tiu ĉi numero vi povas legi pri i.a. interesa lingva seminario en Kungälv, pri la Pacifika Kongreso en aŭgusto kaj pri renovigita Esperanto-Centro en Stokholmo; Krome, SEF kaj La Espero volas deziri al ĉiuj membroj kaj legantoj

**Bonan
Kristnaskon
kaj
feliĉan novan jaron
1993!**

La Espero

Organ för
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Septembro 1992 • 80-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktör: Leif Nordenstorm,
Björknäsvägen 3 C, 961 34 Boden,
tel. 0921 - 123 54

Frågor om prenumeration o.dyl.:
Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21,
111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Sättning: Leif Nordenstorm, Per Aarne
Fritzon

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: Quintus, Sollentuna 1992

Prenumeration: 145 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 75 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34, fax: 08-20 72 20

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11-13 och 17.30-19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1993:

Direktansluten medlem 145 kr.
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.
Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till Esperanto-Centro.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B,
Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj: torsdagar kl. 17-18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Storgatan 13, 753 31 Uppsala



Medlemsavgift till UEA

Det finns all anledning att betala avgiften till UEA för 1993 snarast möjligt. Nedanstående avgifter kan komma att höjas i uari 1993 p.g.a. osäkerheten på valutamarknaden. Som direktmedlem i UEA ger du världsförbundet ett extra stöd, samtidigt som du själv får en del förmåner, t.ex. nedsatt kongressavgift för kategorierna **MJ**, **MA** och **DM**. UEA behöver allt vårt stöd för att kunna genomföra sin arbetsplan. Även gåvor emottages med största tacksamhet. Pengarna kan skänkas till bl.a. fonderna **Canuto** (medlemsavgifter för esperantister i u-länder), **Ameriko** (rörelsen i Latinamerika), **Biblioteko** (UEA:s bibliotek) och **Volontulo** (för ungdomspraktik vid UEA:s huvudkontor i Rotterdam) eller till UEA:s allmänna kassa.

Avgifterna för 1993:

MA	Medlem med årsbok och tidskriften <i>Esperanto</i>	310 kr
MJ	Medlem med årsbok (ungefär 400 sidor)	125 kr
MG	Medlem med <i>Gvidlibro</i>	50 kr
SZ	Societo Zamenhof, för den som vill ge UEA ett extra ekonomiskt stöd. (Medlemskap ingår ej.)	620 kr
PT	Patrono de TEJO, stöd till ungdomsförbundet TEJO, <i>Kontakto</i> och andra TEJO-trycksaker ingår. (Medlemskap ingår ej.)	375 kr
DM	Livstids medlemskap med livstids prenumeration på årsboken och <i>Esperanto</i> .	7750 kr

Den som ännu inte fyllt 30 år 1 januari 1993 och blir medlem i någon av kategorierna **MJ**, **MA** eller **DM** får även *Kontakto* och *TEJO-tutmonde*. Ange därför födelse datum.

Avgiften kan betalas in på pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser. Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.

ANONCETOJ

Interesitoj pri litova filatelo skribu al: Laimus Straznickas. L Giros 74-51, LT-2035 Vilnius-35, Litovio.

Aperis kolora turisma prospekto "Historia Nancio": Office de Tourisme de Nancy, 14, Place Stanislas, BP 810, F-54011 Nancy Cedex, Francio.

Dezirás korespondi:

Kovács Béla, Kaposvár, Béla Király u. 44, H-7400, Hungario.

DONACOJ

Claes Göran Ingestedt, Vällingby 100.

Memore al Folke Nilsson: Fam. Claes Östman, Grimslöv 100.

Klubo cent: Torsten Irdevall, Ämmeberg 100. Estrid Lind, Krylbo 200. Rune Enocson, Solna 100.

Aŭtomataj ĉiumonataj enpagoj: Leif Nordenstorm, Boden 75. Nekonata 100.

Helpu la tanzaniajn ĝemelojn!

Kiel vi scias, SEF ekde pasintjare estas ĝemela asocio de Tanzania Esperanto-Asocio. Nun la tanzania asocio bezonas lokalon kaj ĵus ekhavis eblecon lui konvenan ejon. Kiel vi komprenas, TEA bezonas ekonomian helpon. Kelkaj svedoj jam donacis iom da mono por tiu nova lokalo. Tial mi petas ĉiujn SEF-anojn kontribui. Mi ŝatus vidi, ke multaj kontribuas per malgrandaj sumoj. Tiel ni povas montri solidarecon kun la novaj kaj fervoraj esperantistoj en Afriko. Sendu donacon al **pg 20 12 - 3, Esperantoförbundet**, indikante, ke temas pri "Daresalamo". Dankon!

Roland Lindblom

Seminarianoj kleriĝis kaj kantis samee

La temo de la seminario en la Nordia Popolaltlernejo de Kungälv (30 oktobro–2 novembro 1992) estis "Minoritataj popoloj kaj lingvoj en Nordio" kaj "Lingvo-problemoj en Eŭropo". Partoprenis kvindek da homoj el preskaŭ tuta Nordio, kaj krome el Germanio kaj Belgio. Mirinde estis (almenaŭ por mi), ke partoprenis eĉ tri islandanoj.

La seminario estis tute dulingva. Ĉiuj prelegoj, ĉu svedlingvaj, ĉu esperantlingvaj, estis interpretataj, foje iom improvize, ĉar du el la homoj, kiuj unue ofertis sin por la tasko, lastmomente devis rezigni pri la seminario. Fine la interpretadon prizorgis Ebbe Vilborg, Bertil Nilsson kaj Märtha Andréasson.

La seminario ofertis multajn interesajn erojn. Tiu ĉi raporto prezentos nur kelkajn el la traktitaj aferoj.

Lando de sameoj

De Johannes Marainen, reprezentanto de la samea societo de Gotenburgo, ni lernis multon pri la sameoj (= laponoj).

Sápmi, la lando de la sameoj, etendiĝas sur la Arkta kaloto kaj havas formon de boacofelo. Ĝi ne agnoskas ŝtatajn limojn. Ĉie la sameoj estas minoritata grupo, krom en la norvega komunumo Guov'dageai'dno (Kautokeino). Laŭ

statistikaĵoj nuntempe tamen estas duoble pli da sameoj ol estis antaŭ tridek jaroj. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke post la dua mondmilito multaj sameoj perdis sian identecon, do enkalkuliĝis kiel norvegoj, svedoj aŭ finnoj. Sed nun iliaj infanoj denove ofte volas esti sameoj. Tiu ĉi minoritato estas ŝtate agnoskita en Norvegio kaj Finnlando – ambaŭ landoj estas nun oficiale trilingvaj.

En Svedio la situacio estas alia. Oficiale ĝi daŭre estas unulingva kaj unukultura. Sameoj en Svedio estas svedaj ŝtatanoj, kiuj ne povas uzi sian lingvon en oficialaj cirkonstancoj. (Nur enmigrintoj el suverenaj ŝtatoj povas tion fari.) Same, kiam en 1986 en Åre ekestis la samea flago (vidu ilustraĵon), tiu evento estis raportita en tuta Nordio, eĉ eksternordie, sed ne en Svedio.

Tri diversaj lingvoj

Ekzistas tri diversaj sameaj lingvoj, kies teritoriaj limoj ne kongruas kun la ŝtataj. La nordsamean lingvon parolas ĉ. 90 % el la sameoj. Sude de la rivero Ume oni parolas la sudsamean, kaj sur la Kola duoninsulo uzatas la skoltsamea. La diferencoj inter la tri estas tiom grandaj, ke ne eblas interkompreno.

Troviĝas kunlabora organizo, Nordia


Samea Konsilio, kiu estas ia ekvivalento de la Nordia Konsilio (*Nordiska rådet*).

En la kvin sameaj lernejoj nun funkciantaj en Svedio, infanoj povas dum la kvar unuaj jaroj ricevi ĉiufakan instruadon en la samea aŭ en la sveda. Post la



Pri la eskimoj, loĝantaj de Siberio tra Kanado ĝis Gronlando, prelegis Anne Wagner.

(Fotis: U. Luin)



La samea flago, uzata ekde 1986. La koloroj ruĝa, flava kaj blua estas tradicie uzataj por nordsameaj vestaĵoj, dum la verda estas tipa por la sudsameoj. La ringo estas simbolo de la origina samea sun-dio, varma tage kiel suno, malvarma nokte kiel luno.

kvara jaro la fakoj miksiĝas, kaj nur la sameecaj fakoj (ekz. lingvo, samea historio, slojdo...) estas instruitaj en la samea, ĉiuj ceteraj en la sveda. Montriĝis, ke plej bone lernas la samean lingvon ne tiuj infanoj, kies gepatroj havis ĝin kiel unuan lingvon (plejparto estas almenaŭ du- aŭ trilingvaj), sed tiuj, kies gepatroj kiel plenkreskuloj mem relernas la lingvon kaj tiel montras ĝin valora kaj lerninda.

"Analfabeto" fariĝis poeto

La samea poeto Paulus Utsi estis "analfabeto": la svedan li ja sciis skribi, sed la samean li regis nur buŝe. Li plenkreskule relernis ĝin per "maĉo" – lia unua poemaro havis la titolon *Giela Giela*, kio estas vortludo: "ligi la lingvon/maĉo de la lacerto". Post lia morto en 1975 eldoni-

ĝis plia poemaro, titolita *Giela Gielain* ("ŝnurligi per la lingvo"). Ĉiuj liaj poemoj estas dulingvaj en la samea kaj la sveda. Unu el ili, "Mia hejmo estas mia koro", estis proponita kiel samea himno en 1986, sed oni preferis tekston "Mia hejmlando". Aŭdacemaj seminarianoj kantis ĝin post iometa ekzercado, kompreneble originalversie.



Johannes Marainen naskiĝis en norda Svedio kun tri denaskaj lingvoj: la samea, la finna kaj la norvega. Nun li estas instruisto en Gotenburgo kaj ĉe la samea altlernejo en Luleå.

(Fotis: U. Luin)

Teorio kaj praktiko en EK

Michael Cwik el Belgio montris en sia prelego, ke en la Eŭropa Komunumo, eĉ oficialaj lingvoj suferas diskriminacion, kvankam ili ĉiuj estas jure egalaj. Estas ja kontrasto inter la oficiala kaj praktika lingvaj situacioj en EK. Oficiale: jure ĉiu oficiala lingvo estas egala al la ok ceteraj. Do ĉiu decido aŭ regulo estas tradukenda kaj publikigenda en ĉiu oficiala lingvo, kaj ĉiu oficisto povu uzi sian denaskan lingvon parole kaj skribe (ni forgesu momente, ke ekzistas ankaŭ neoficialaj lingvoj). Praktike: Dum komisiaj kunsidoj ne troviĝas interpretistoj, kio kaŭzas duoblan diskriminacion, ĉar ĉiu ĉeestanto devas scii almenaŭ pasive kaj la anglan kaj la francan.

En kontakto kun la aŭtoritatoj, ĉiu ci-

vitano povas uzi sian propran lingvon. Tion povas ankaŭ la parlamentanoj, dank' al tradukistoj. Sed montriĝas, ke plurnacia organizaĵo praktike povas labori efike nur uzante unu lingvon.

Esperantistoj ŝatas emfazi pri la gigantaj tradukkostoj ene de EK, sed Michael Cwik substrekiis, ke tio estas la prezo pagenda por demokratia situacio. Ĝis nun oni ne akceptis Esperanton inter alie pro tio, ke ĝi ne estas oficiala EK-lingvo.


Islanda kaj feroa

Interesaj estis ankaŭ la prelegoj de Baldur Ragnarsson (islando) kaj Birgitta Hylén (Svedio). La islanda estas purisma lingvo, kiu malvolonte akceptas pruntvortojn. Ĝi apenaŭ ŝanĝiĝis dum la pasinta jarmilo, dum kiu amasiĝis mirinde riĉa literaturo. Ĉiu islandano do povas legi antikvan islandan beletron sen aparta preparo. Tiu lingvo havas marginan situacion en Nordio. Ĝi estas tre malmulte konata de eksterlandanoj. Islandanoj lernas devige la danan en lernejo, sed renkontas problemojn okaze de kontaktoj kun aliaj nordianoj. Ĝenerale mankas en Nordio informado pri islandaj lingvo, kulturo kaj socio.

La feroa estas skribe proksima al la islanda, sed fonetike malsimila. Malkiel la islanda, la feroa ne estas tradicie skriba lingvo. La plej malnova teksto estis skribita en la 18-a jarcento. La unua feroa vortaro ne aperis pli frue ol en 1952.

Esperanto por sameoj?

Konkreta rezulto de la seminario devus esti la eldono de Esperanto-lernolibro en la samea. Tiu ideo origine venis de finlandaj esperantistoj. Se tia libro aperos,



Ulrich Becker el Berlino estas unu el la gvidaj personoj en la esperantista organizaĵo Monda kunagado, kies celo estas apogi Uneskon kaj informi pri ĝi, kaj kiun li prezentis per prelego en Kungälv.

ĝi estu en la nordsamea, ĉar tiu varianto estas la plej parolata. Anstataŭ esti kopio de aliaj lernolibroj, ĝi prefere spegulu la vivon de sameoj. Baldur Ragnarsson emfazis, ke oni havu Esperanto-lernilojn en kiel eble plej multe da lingvoj. Ĝis nun tia lernolibro restas nur projekto, sed estas ja fakto, ke hodiaŭ la sola nordia kulturo ne reprezentata en Esperanto estas la samea, kaj ĝi sendube meritas diskonigon.

Ann Wagner



Michael Cwik (dekstre) estas oficisto de la Eŭropa Komunumo en Bruselo kaj prelegis pri la lingvoproblemoj de ĉefe la granda administra deĵorantaro. (Fotis: U. Luin)

Saluto el Pacifika Kongreso

Inter la 17-a kaj 22-a de aŭgusto 1992 okazis la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en la verda urbo Qingdao, situanta ĉe la Pacifiko norde de Ŝanhajo. Alvenis 800 partoprenantoj el 18 landoj de ĉirkaŭ la Pacifiko kaj el Eŭropo. El Svedio venis, krom mi mem, ankaŭ Herman Theobald kaj Puff Östling. (Puff cetere ĉiam dankas min por tio, ke mi instruis al ŝi esperanton dum la periodo de junulara agado en Örebro; nun ŝi de tempo al tempo loĝas en Ĉinio kun sia ĉina edzo, kiun ŝi ekkonis dum la UK en Pekino.)

Fervoraj infanoj

Dum la inaŭguro, la kongreson salutis ne nur la kutimaj vortoj de politikistoj, gravuloj kaj diverslandaj salutantoj, sed ankaŭ grandega, fervora, gaja kaj klare prononcanta infankoruso – infanoj, kiuj studis esperanton en la elementa lernejo. Ili kantis kaj komune deklamis tiel klare, ke oni bone aŭdis ĉiun vorton. Tuj post la inaŭguro de la kongreso, la ĉefpolitikisto de la urbo inaŭguris Zamenhof-statuon apud "Hotelo Espero". La eksterlandaj esperantistoj estis transportitaj tien per aŭtobusoj, sed bedaŭrinde multaj el la ĉinoj devis piediri kaj apenaŭ povis ĉeestis la falon de la statua kovrotuko.

Konkretaj diskutoj

La kongresa temo estis "Kunlaboro kaj progreso en la pacifika regiono" kaj abundis diskutoj konkretaj kaj progresigaj inter ĉirkaŭpacifikanoj, precipe inter la aziaj. Oni diskutis i.a. pri komerco per esperanto, turismo per esperanto kaj pri originala literaturo en esperanto kaj eventualaj tradukoj al la ĉina. Tiun lastan kunvenon ĉeestis pluraj profesiaj ĉinaj verkistoj.



Frumatena meditado

La matenoj komenciĝis je la horo 6.30 per instruo de *tajĵijuan* – la ĉina "medita gimnastiko". Dum la tagoj oni prezentis rapidan kurson pri la ĉina lingvo – iom tro rapidan por tiu, kiu ankoraŭ ne konstruis firman bazon por tiu lingvo. Okazis ankaŭ demonstroj de akupunkturo kaj ĉina medicino. En la grupa malvarmuma infektado mi mem tute konkrete spertis la ĉinan medicinon. Pluraj profesiaj ĉinaj pentristoj montris sian teknikon pri pentrado kaj kaligrafio. Krom tio okazis multaj interesaj folkloraj kaj artaj programoj, kaj instruaj ekskursoj en la urbo. Qingdao iam estis komerca centro de la germanoj kaj pro tio havis iom da germana arkitekturo; germana preĝejo okupis frapan lokon inter la urbaj konstruaĵoj. Ni daŭrigis al grandega subtera kaverno kun multaj figuroj el ĉinaj fabeloj kaj mitoj, al sankta monto kun Laŭzi-templo en brilaj blu-verdaj kaj oraj koloroj. Ni vidis profesie faritajn filmojn kun bone parolitaj esperantaj tekstoj pri Qingdao, Interna Mongolio kaj aliaj lokoj, kiuj konigis la ni la forte evoluantan Ĉinion.

Cento da vizitkartoj

Sed plej interese el ĉio estis vidi kaj sperti kiel la ĉinoj, ĉu spertaj esperantistoj aŭ komencantoj, kontaktis kaj parolis kun la eksterlandanoj. Dekoj, eble centoj da vizitkartoj trovis la vojon en la valizon. Ĉion prosperan kaj ĝojan mi deziras al la ĉinaj esperantistoj kaj dankas al ili por bona laboro dum la kongreso.

Post kvar jaroj la 6-a Pacifika Kongreso okazos en Vladivostok!

Kerstin Rhodin

Klistermärken!

10 stora dekaler
eller

5 ark à 24 små klistermärken
50 kronor



Beställ från Esperanto-Centro idag!



Libroj en "nova" Esperanto-Centro...

Nova biblioteko en Esperanto-Centro

Ole Hansen (dekstre) respondecas pri la biblioteko en Esperanto-Centro en Stokholmo. Dum la lastaj jardekoj necesis translokigi la librojn plurfoje, kaj multaj el ili kuŝis forpakitaj en skatoloj, parte eĉ en foraj stokejoj. Finfine eblas kunigi kaj elpaki ĉion, sed restas granda laboro reordigi la librojn, trarigardi aldone ricevatajn librojn, kaj aktualigi la katalogon. Dank' al la novinstalitaj ŝoveblaj arkivbretaroj, la tuta kolekto de libroj kaj gazetoj nun almenaŭ estas facile atingebla kaj superriĝardebla. Laŭplane iuj duoblaĵoj estos prunteblaj. (Fotis: U. Luin)



Nova novelkolekto


La nova kolekto de noveloj, verkitaj de Sten Johansson, estas malgranda kajero kun 9 mallongaj rakontoj. Ulf Ribers el Motala (supre) prezentis ĝin dum septembra kunveno en Esperanto-Centro. La libro nomiĝas "Denaska kongresano kaj aliaj noveloj", mendeblas ĉe Esperanto-Centro kaj kostas 30 kronojn. (Fotis: U Luin)

Vizito post renovigo

En septembro okazis re-inaŭguro de Esperanto-Centro en Stokholmo, kiu ja ekhavis tute novan aspekton dank' al diligenta dumsomera laboro de kelkaj esperantistoj (vidu noticon sub "Tra la lando"). Vizitantoj venis ankaŭ el Västerås, kiel Hillevi kaj Gunilla Sundholm (dekstre). En la bretaro malantaŭ ili, vi trovos lernolibrojn, vortarojn, materialon pri esperanta literaturo kaj historio, muzikkasedojn kaj novajn beletrajn verkojn en esperanto. Krome estas ankaŭ breto por miksita literaturo. (Fotis: U Luin)



Aŭtuna konferenco en novembro



Per Aarne Fritzon kaj Bertil Andreasson dum paŭzo en la aŭtuna konferenco de la estraro kaj regionaj respondeculoj. (Fotis: U. Luin)

La estraro de Sveda Esperanto-Federacio konferencis komence de novembro dum semajnfino en Stockholm. Ankaŭ regionaj respondeculoj partoprenis: Lennart Svensson, Nils Pettersson, Lisbet Andreasson, Sten Broman. Anita Bergh kaj Gunnar Olsson ĉeestis, krom la estraranoj kaj reprezentantoj de SEJU.

Kelkaj el la estraranoj venis kvazaŭ rekte el la foiro pri edukado, en kiu Sveda Esperanto-Federacio havis budon. La foiro finiĝis la tagon antaŭ nia konferenco, kaj la diskuto de la konferenco temis parte pri la rezultoj de tiu inform-budo en la foiro.

Roland Lindblom, kiu estas prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio, starigis plurajn malfacilajn demandojn al la konferencanoj.

Ĉu esperantolaboro povas okazi en alia formo ol klubo? Jen demando kiu elvokis diskuton. Laŭ multaj, la kluboj estas necesa bazo por la stabileco de la esperanto-movado. Oni povas kompletigi la kluban laboron per diversaj projektoj, por ekzemple aktivigi esperantistojn en

aliaj urboj, sed oni devas konscii, ke tiaj projektoj eble ne estas longdaŭraj. Aliaj opiniis, ke en multaj lokoj la tradicia klubo povas esti tro stagniga formo de agado, kiu fakte baras novajn iniciatojn kaj fortigas homojn kun aliaj preferoj.

Ĉu ni postulu ion de la membroj? Jen eĉ pli diskutinda demando. La sola afero, kiun ni povas postuli, por ke membro estu membro, ja estas la pago de membrokotizo! Sed ĉu necesas io plia por fariĝi membro? Ĉu necesas scii paroli esperanton? Ĉu necesas simple scii kio estas esperanto, kaj favori la ideon? En niaj informmaterialoj ne estas klara respondo al tiuj demandoj.

La praktikaj rezultoj el la konferenco estos unuavice reagoj al la kontaktoj faritaj dum la foiro pri edukado, en formo de dissendoj al celgrupoj en la eduka merkato. Krome, laborgrupo je tri personoj trarigardos la aktualan oficialan proponon pri novaj instruplanoj por la lernejoj, kaj proponos eventualan reagon al ĝi rilate al la lingvoinstruado.

Ulla Luin

Esperanto-budo en edukfoiro

En la granda foirejo de Älvsjö en Stokholmo okazis inter la 3-a kaj 6-a de novembro la granda lerneja kaj eduka foiro *Utbildning 92*. Multaj ekspoziciantoj proponis siajn rimedojn por pli valora kaj efika edukiĝo, kaj inter ili troviĝis ĉi-jare ankaŭ SEF. Vizitis la foiron ĉ. 22 000 personoj, ĉefe instruistoj.

En tia ĉi kunteksto plej efikas koncentriĝi je unu klara mesaĝo. La fokuso de la SEF-ekspozitaĵo do estis la fakto, ke kono de esperanto plifaciligas postan lernadon de aliaj lingvoj. Tio vekis la intereson de nemalmultaj pedagogoj. Scivolemuloj povis konatiĝi kun i.a. esperantolerniloj diverslingvaj, kaj lasis la budon kun faktfolioj



speciale direktitaj al instruistoj. Al preterpasantoj oni disdonis informajn numerojn de *La Espero* en grandaj kvantoj.

Dum la kvar tagoj deĵoris alterne Kaisa kaj Ole Hansen, Per Aarne Fritzon, Jan Milld, Anita Bergh kaj precipe la nelacigebla Roland Lindblom. Ĉe ĉiuj deĵorantoj postrestis impresoj de senteble favora intereso flanke de la publiko. Kvankam partopreno en tia foiro estas sufiĉe multekosta afero, la investo evidente valoras, se oni nur direktas sin al specifa kaj taŭga celgrupo kaj preparas sin zorge.

La esperantobudo estis malgranda laŭ amplekso, sed bonege plenumis sian funkcion, dank' al lerta kaj eleganta aranĝo de Carl Pettersson el Norrköping, profesia dekoraciisto.

Per Aarne Fritzon

Samnordisk ungdomsträff i Göteborg

Under ett SEJU-styrelsemöte i början av 1992 diskuterades vissa problem – t.ex. varför den gemensamma nordiska ungdomstidningen *Kvinpinto* slutat utkomma. Trots alla kontaktförsök med redaktören i Finland uteblev svaret. Vad tyckte då ungdomsförbunden i de övriga nordiska länderna (Norge, Finland, Danmark) om detta sakernas tillstånd? Fanns det kanske även andra frågor som borde diskuteras gemensamt? Kanske fanns det fler saker man kunde samar-

beta om över de nordiska gränserna?

Med dessa frågor som grund bestämdes att SEJU skulle ordna en samnordisk arbetsträff för aktiva esperantoungdomar – *Nordia junulara renkontiĝo* – hösten 1992.

Intresset för träffen blev positivt. Sammanlagt 22 deltagare från Sverige, Norge och Finland hittade ut till Tuve idrottsgård på Hisingen i Göteborg. Tyvärr kom det inga deltagare från Danmark, då denna träff råkade krocka med ett an-


nat, för danskarna kärt möte.

Det som främst diskuterades var tidningen *Kvinpinto*. Skulle dess överlevnad kunna tryggas? Jada, nu är arbetet på gång igen, nu fördelat över Stockholm, Göteborg och Träskända (Finland). Det första nya numret väntas dyka upp i början av december.

I övrigt kunde man få chansen att göra sig masker, figurer m.m. i gips, vilket var spännande men något som endast några få vågade sig på. En tipspromenad fick folk att ge sig ut bland höstlöven i det vackra solskenet. Kvällarna och nätterna ägnades åt diskussionsgrupper och videofilmer med esperantoanknytning, men kanske främst åt lekar och spel av alla slag. Ju galnare och stressigare, desto mer skattkramper.

Jättetrötta men nöjda åkte alla hem till sig. De norska ungdomarna åtog sig uppgiften att anordna ett nytt *Nordia junulara renkontiĝo* 1993, någonstans i de norska fjällen (??). Vi ser fram mot detta!

Keiko Snarberg



Övre bilden: SEJU-styrelsen passar på att sammanträda under träffen i Göteborg. **Nedre bilden:** Svenska, norska och finländska deltagare i en typisk "galen och stressig" lek.

SEJU-träff i Skåne

I vår planerar SEJU en kurshelg för alla barn och ungdomar mellan 7 och 30 år (både nybörjare och fortsättare) i Lund. Preliminärt datum är 16-18 april. Vi får två erfarna kursledare: Inga Johansson och Anna Maria Lange.

Om du själv är under 30 år eller om du har barn eller barnbarn som du tror är intresserade så pricka redan nu in kursen i almanackan. Mer information kommer i nästa nummer av *La Espero*.

Obs! Föräldrar får naturligtvis också delta!

Kajsa Larsson

Tra la lando

SEF petis milionon

de la "Delegacio de informado pri eŭropa integriĝo" por produktado de studmaterialo pri la lingva problemo en Eŭropa Komunumo kaj por aranĝado de kursoj. Ĉi-foje la respondo estis "ne", sed ĉiam valoras kandidatiĝi al anoncigitaj subvencioj.

Libroj pri spiritismo

La biblioteko de SEF ricevis donacon de Olof kaj Maria Bergman kaj Sonia (nekonnata familia nomo): libroj en esperanto pri spiritismo. Ni dankas.

Multaj kursoj en Stokholmo

Ĉi-aŭtune la Esperanto-Klubo de Stokholmo reklamis kvin diversajn kursojn: lunde porĝejunula komencantnivela; marde komencanta; merkrede enkonduko/korespondkurso; ĵaŭde komencantnivela kaj dimanĉe helpo por memlernantoj.

Kursoj aranĝiĝas ankaŭ en Tyresö kaj en Upplands Väsby. Interesa ideo en Väsby estas kurso pri internacia kuirado — kompreneble en esperanto.

Renovigita Esperanto-Centro

Dank' al grandega dumsomera laboro de Kaisa Hansen, Ole Hansen, Hans Dahl kaj Anita Bergh, la centro en Brunngatan 21, Stokholmo, nun estas renovigita kaj tre freŝaspekta. En la spacon de la iama presejo translokiĝis la biblioteko, kio liberigis ankaŭ la kelon por kunvenoj kaj kursoj. Per instalado de surrele ŝoveblaj arkivbretaroj oni konsiderinde pligrandigis la spacon disponeblan por la bibliotekaj kolektoj.

Ole Hansen kaj Ingemar Nordin ellaboris kriteriojn por la biblioteko. Unu ekzemplero, en kelkaj kazoj du, konsistigos la nepruntan bibliotekon. Superfluaĵlibroj estos prunteblaj. Fruaj gazetoj (ĝis la

20-aj jaroj) kaj ĉiuj svedaj tutlandaj esperanto-gazetoj konsistigos la gazet-kolekton.

Umeå subtenas bibliotekojn

La esperanto-klubo en Umeå aliĝis al la nacia kampanjo "Savu la bibliotekojn". La kampanjo ekestis, ĉar en multaj komunumoj ekzistas planoj malestabliti bibliotekojn por ŝpari monon. Nun ekzistas ĉirkaŭ 1900 bibliotekoj en Svedio.

Informiĝu pri la kampanjo ĉe: Sveriges Författarförbund, Drottninggatan 88 B, 111 36 Stockholm, tel. 08-791 22 80.

Ivar Nilsson



Reklamo kaj esploro

SEF dum la aŭtuno provis novajn tipojn de reklamo: Anonco en speciala suplemento pri libertempaj studoj de la ĵurnalo Expressen, tekstotelevida reklampaĝo en la perkabla kanalo TV5 Nordic kaj partopreno en la edukfoiro en Älvsjö 3-6 de novembro 1992.

Zandra Sjögren en Stokholmo faris lernejan laboraĵon pri esperanto intervjuante klubanojn en Uppsala.

60-jara klubo en Skövde

Skövde Esperantoklubb festis sian 60-jaran jubileon per gaja aranĝo. Partoprenis 60 esperantistoj el Skövde, Falköping, Skara, Mariestad, Götene, Jönköping, Örebro, Göteborg kaj Kungälv.

Estinta multjara klubprezidanto Lenart Åberg kaj alia veterano, Stig-Arne Jacobson, rakontis memorojn. La nuna prezidanto, Karl-Gustaf Gustafsson, prezentis gajan parafrazon de la konata Julio Baghy-poemo "Estas mi esperantisto". Åke Rhodin el Örebro legis proprajn aforismojn. Bonan etoson kreis ankaŭ multo da muziko, kanto, bongustaj manĝaĵoj kaj dancado.

SEF gratulis per la nova *Krestomatia*, kaj multaj kluboj pere de siaj reprezentantoj transdonis belajn donacojn. Telegramoj venis interalie el Usono kaj Estio.

Börje Andersson

305-jara jubileo en Väsby

Sabate la 17-an de oktobro 1992, Esperanto en Väsby festis sian 305-jaran jubileon! Laŭ unu el la festparolantoj, Roland Lindblom, tio estis la plej olda jubileo en Esperantujo, ĉar la lingvo mem havas nur 105 jarojn!

Kompreneble temas pri kompilita jubileo, ĉar nia klubo havas ĉi-jare multajn gravajn jubileojn, kiuj kune fariĝas 305. Ni kalkulis tiel: 5 por la klubo, 40 por la urbocentro, 20, 40, 50, 70 kaj 80 por ceteraj de niaj klubanoj.

La plej eminenta el ili estas Erik Bohlin, nia propra esperanto-profesoro, kiu festis sian 80-an naskiĝtagon la 18-an de novembro. Li estas unu el la fondintoj de la klubo en Skövde, kiu festis sian 60-jariĝon la 17-an de novembro.

La festotago fariĝis tre ĝoja kaj ege memorinda dank' al gratulantoj, kiuj kontribuis pere de donacoj, floroj, festoparoladoj, kantoj kaj muziko. Ni tutkore dankas ĉiujn!

Aparte memorinda estas la teksto de

Edith Köhler pri ĉiuj niaj gejubileuloj. Ni ankaŭ kantis belan tekston de Birger Viggén al la melodio *Ja mǎ han leva*, kiu estas multe pli bela ol la sveda teksto, kaj ni volus, ke vi ĉiuj lernu ĝin. Jen ĝi estas:

*Ni vin gratulas, ni vin gratulas
ni vin gratulas via amikar'
Vivu vi longe, vivu vi sane,
vivu feliĉe vi en ĉiu jar'.*

Ole Hansen

ABF-tago en Upplands Väsby

La 10-an de septembro 1992 la diversaj lokaj ABF-rondoj havis la eblecon infor-

mi la publikon pri siaj agadoj en la komercocentro de Upplands Väsby.

La klubo Esperanto en Väsby kontribuis per ŝirmekspozicio kaj disdonado de broŝuroj. Tie deĵoris dum la tuta tago nia prezidanto Ole Hansen, kaj al li kuniĝis poste ankaŭ Roland Lindblom kaj membroj de nia klubo. La loĝantoj de nia komunumo montris grandan intereson kaj scivolemon pri Esperanto.

La tuja rezulto estis, ke la librovendejo konsentis vendi la lernolibron *EK!* kaj la biblioteko starigis la ŝirmekspozicion en sia ejo. Tio okazis dank' al la nelacigebla Kaisa Hansen! Ni nun atendas la netujan rezulton – pli da membroj al nia klubo!

Anita Bergh

Tra la mondo

Nova lernolibro en la sveda

Novaj esperanto-lernolibro en la sveda kaj en la albana aperos en Kroatio. Ĝi uzas la t.n. Zagreban metodon. La libro jam antaŭe aperis en la angla, germana, kroata, franca, kirunda, itala, hungara, finna, malta, korea, japana kaj kataluna lingvoj.

Kiom da esperantistoj ekzistas?

Ni simple ne scias kiom da esperantistoj ekzistas, ĉar ne ekzistas bona statistiko. Tion asertas Bernard Golden en interesa artikolo en *Internacia Pedagogia Revuo* 2/92. Li refutas diversajn publikigitajn taksojn (de "50 000" ĝis "milionoj"), tamen opiniante ke la unue menciita takso de la svedo Lennart Åberg (50 000), estas pli proksima al la realo ol la aliaj.

Laŭ Golden oni unue devas decidi, ĉu oni fakte parolas pri esperantistoj (sciantoj kaj uzantoj de la lingvo) aŭ ankaŭ pri esperantanoj (apogantoj) ktp. Se oni decidas ke oni kalkulu nur la esperantistojn, oni ankaŭ devas decidi ĉu oni kalkulu nur esperantistojn kun bona lingvoscio, aŭ

ankaŭ komencantojn. Poste oni faru statistikan enketon.

Ĝis tiam, ni simple devas respondi: "Ni ne scias kiom da esperantistoj ekzistas."

La Espero en komputilreto

Martin Weichert en Gotenburgo publikigis sciigojn el *La Espero* 3/1992 en la novaĵgrupo *soc.culture.esperanto*. Tio

estas perkomputila periodaĵo legata ĉie ajn, kie ekzistas esperantistoj kun konekto al komputila reto.

Pli pri komputilaj retoj kaj ilia ebla rolo por esperanto skribis Derk Ederveen en la novembra numero de revuo *Esperanto*.

Renkontiĝo kun esperantistoj en Talino

Dum mia semajnlonga vizito al Estonio en la komenco de septembro ĉi-jare, mi havis la eblecon renkontiĝi kun kelkaj membroj de la talina esperanto-klubo. La 8-an de septembro estis organizita speciala kunveno okaze de vizito de du germanaj esperantistoj. Bedaŭrinde ili ne alvenis, anstataŭe venis mi! Okazis ĝoja interbabilado en la kafejo de la redakcio, kie laboras Ahto Kaljusaar, kaj poste kelkaj el ni daŭrigis nian renkontiĝon ĉirkaŭpromenante en la malnova urbo de Talino. Estis tre agrable denove renkonti geamikojn, kun kiuj mi konatiĝis en Bergen, Oskarshamn kaj Vieno.

Anita Bergh

Sur la bildo: Jan Ojalo, Ellen Rüm, Eden Puskar, Anitha Berg, Viive Tammepold kaj Ahto Kaljusaar



Transportado inter komputilsistemoj

Lastatempe ni publikigis multe da materialo pri komputiloj kaj esperanto. Tiuj artikoloj ofte povas ŝajni tre teknikaj, sed ni pensas, ke ili tamen havas ĝeneralan intereson, ĉar ene de malmultaj jaroj komputiloj estos la plej kutima rimedo por verki kaj komposti en esperanto. Do, eĉ se vi ankoraŭ ne anstataŭis vian fidelan tajpilon per komputilo, ŝparu tamen la artikolojn. Povas esti, ke vi baldaŭ havos kaŭzon reveni al ili!

Sube Karl-Gustaf Gustafsson aldonas kelkajn komentojn al antaŭaj artikoloj pri tiu ĉi temo:

Laŭ mi, la plej taŭga kaj praktika metodo transporti esperanto-tekstojn inter du komputilaj sistemoj aŭ komputilprogramoj estas tiu proponita de Per Aarne Fritzon en *La Espero*, nome ke oni uzu la t.n. x-kombinojn (ekz. ĉ = cx, Ĉ = Cx, ĝ = gx, ktp). Almenaŭ tio estas plej praktika por svedoj. Por ĉinoj tiuj x-kombinoj povas esti ĝenaj, ĉar ili ofte uzas la literon x kiam ili transskribas vortojn el sia propra lingvo per latinaj literoj.

La sistemo TEX (elparolu *teĥ*), menciita de Christer Kiselman en *La Espero* 4-5/92, havas la avantaĝon ne ĝeni la ĉinan transskribmetodon. Ĝi estas tamen iom peza, ĉar estas bezonata po tri kodlokoj por ĉiu litero (en unu kazo kvar).

Do, kial ne internacie konsenti, almenaŭ ĝis la nova UNICODE estos preta kaj

ĝenerale akceptita, ke:

$\backslash j = \hat{j}$, $\backslash J = \hat{J}$, $\backslash h = \hat{h}$, $\backslash u = \hat{u}$, $\backslash U = \hat{U}$.

Tiel ne necesas kunsendi la ĉapelon aŭ la hoketon en ASCII-kodigitaj esperanto-tekstoj, kiujn oni volas transporti al aliaj komputilsistemoj aŭ -programoj. Devus esti facile konverti ekz. $\backslash j$ al \hat{j} por ekranaj celoj aŭ al jx por ekz. literumadkontrolo per svedlingva literumadkontrola programo, kiu ne akceptas \backslash , ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ kiel literoj.

Kiun klavarsitemon oni elektas ĉe la celkomputilo ne gravas. Ĉu oni uzas tiun de Franko Luin aŭ tiun de Christer Kiselman aŭ iun alian metodon dependas de persona gusto. La metodo uzi la Alt-klavon kaj la bazan literon (t.e. c, g, h, j, s kaj u) estas tre logika ĉar Alt aludas al alternativa alfabeto = la alfabeto de Esperanto.

Hodiaŭ eblas tre facile per la programo Fontographer 3.5 laŭ propraj bezonoj redakti (adapti) litertiparojn por skribprogramoj, kiuj laboras sub la operacisistemo Windows kun TrueType.

Se iu bezonas helpon ŝanĝi litertiparon, mi estas preta helpi. Telefonu 0500/43 09 73 vespere aŭ skribu al Karl-Gustaf Gustafsson, Aspvägen 1 A, 541 41 Skövde, por pliaj informoj.

Karl-Gustaf Gustafsson

Skizoj el la viena UK

1

La 25-an de julio, sabatposttagmeze, okazis al mi grava akcidento survoje al la kongresejo. Ambulanco veturigis nin al la universitata kliniko, kaj tie mi kuŝis tutan posttagmezon, dum mia edzo sidis maltrankvile sur benko en la atendejo. Kia mizerolo!

Dum la "nacia vespero" en la dimanĉo tamen okazis io. Lasta programero estis prezento de la valso *Blua Danubo*, kaj poste la dancgrupo sur la podio venis al la publiko por peti kundancon. Du dancistoj unu post alia venis al mi kun dancpeto. Bedaŭrinde kaj feliĉe mi povis montri mian vunditan piedon por komprenigi al ili. Kia bonŝanco! Ĉar mi ne sciis kiel danci. La kompatinda piedo savis min. Kiu esprimis, ke la feliĉo kaj malfeliĉo ĉiam akompanas unu la alian?

2

Ĵaŭde aŭ vendrede mi aŭdis, ke iu esperantistino ŝtelis monon en la urbo kaj estis kaptita de la polico. Kiel aliaj esperantistoj, mi estis iomete ŝokita. Do, mi rakontis pri tio al mia edzo. Tiam li demandis al mi:

- Ĉu ŝi faris tion en la kongresejo?
- Ne, en la urbo.
- En la urbo? Ah, tiam ne gravas!
- ? !

3

La plej ŝatata programero dum la kongreso estis la kabaredaĵo de f-ino Barlaston. Verŝajne ŝiaj humuraj komentoj kaj rakontoj pli bone efikis bonfartigi la publikon ol la duona masaĝo (= diina masaĝo).

F-ino Barlaston serĉis la UEA-prezidanton John Wells en la publiko. Li ĉeestis, kaj ŝi rakontis la jenon:

(Al John Wells:) "Mi jam antaŭ longe renkontis vin en iu kongreso. Tiam mi estis juna kaj vi estis nur juna knabo, ĉu ne?" (Al la publiko:) "Tiu knabo petis al mi kune danci. Sed tiam mi estis en malbona humoro kaj mi ne volis danci kun malgranda knabo. Pro tio mi repondis:

- Ne dankon, mi ne dancas kun infano.
- Tiam la knabeto pririgardis min kaj respondis:

- Pardonon, fraŭlino, mi ne sciis, ke vi estas graveda."

Boo-Mee Kim-Lindblom

ALVOKO

La vigla afrika movado suferas je manko de mono kaj instruistoj. Troviĝas pluraj eblecoj faciligi la laboron de niaj junaj samideanoj.

- 1 SEF ĝemeligi kun Tanzania Esperanto-Asocio. Via klubo povas ĝemeligi kun tanzania klubo.
- 2 Danacu al Fonduso Afriko de UEA. Iu ajn sumo estas bonvena kaj plej facile vi pagas al la sveda poŝtĝira konto de UEA: 7 43 74-0.
- 3 Korespondu kun unu aŭ pluraj afrikanoj kun lingva gvidado. Adresojn de tanzanianoj peras Anita Dagmarsdotter.
- 4 Kontribuu al fonduso por vojaĝstipendioj al tanzanianoj.

Informoj: Anita Dagmarsdotter, Mariehamngatan 18, 164 79 KISTA

Neeŭropaj vortoj en esperanto: La ekzemplo "Allah"

Dum la tuta historio de Esperanto la demando pri novaj vortoj, neologismoj, estis afero, pri kiu okazis akraj diskutoj kaj pri kiu la opinioj estis disaj. Tamen preskaŭ ĉiam temis pri enkonduko de novaj eŭropaj vortoj por anstataŭigi kunmetaĵojn. La demando pri enkonduko de novaj ekstereŭropaj vortoj por priskribi nociojn, kiuj mankas en eŭropaj lingvoj, estas alia afero. Tibor Sekelj tuŝis tiun ĉi demandon en sia libro *Elpafu la sagon*, kie li argumentas por enkonduko de certa nombro da novaj vortoj prenitaj el afrikaj, aziaj, sudamerikaj kaj oceaniaj lingvoj. Tiu ago, laŭ Sekelj, havus du celojn. Unue, ĝi estas komenco de la tre necesa kompletigo de Esperanto per vortoj ekstereŭropaj. Due, la celo estas ĉiun nocion nomi per la "ĝusta vorto".¹

Mi partoprenis diskuton pri la opinioj de Sekelj en la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino en 1986. Nemalmultaj el la ĉeestantoj (laŭ mia kalkulado) kritikis tiun ĉi nesufiĉe planitan enkondukon de neeŭropaj vortoj en *Elpafu la sagon*. Ĉino atentigis ke el la kvar vortoj en la libro, kiuj laŭ Sekelj estas ĉinaj (*ĝanpino*, *maozio*, *svejalti*, *tuo*)² li retrovas la ĉinan originon de du. Cetere, 'maozio', kiu laŭ Sekelj havu la Esperantan signifon "larĝa konusforma ĉapelo el palmfolioj aŭ bambuo", en la ĉina estas samsignifa kun 'ĉapelo', sendepende ĉu temas pri ĉina, eŭropa aŭ alispeca ĉapelo.

La diskuto pri eventuala kompletigo de la Esperanta vortrezoro per vortoj el neeŭropaj lingvoj tamen ne povas ĉesi per la pekina malvenko de Sekelj. Eventuala enkonduko de novaj vortoj devas esti diskutata inter fakuloj de diversaj kampoj. Ne eblas ĝenerale respondi, ĉu oni enkonduku neeŭropajn vortojn aŭ ne. Oni devas diskuti pri ĉiu unuopa vorto. En tiu ĉi artikolo mi diskutos nur unu ekzemplon.

Teologio kaj kulturhistorio

Kiun vorton oni uzu por la dio de la islamanoj en esperantlingva teksto, "Allah",



Frazo kun la vorto "Allah" en bela araba kaligrafio laŭ formo de leono.

"Alaho", aŭ "Dio"? D-ro Italo Chiussi en sia traduko de "La Nobla Korano" uzas la araban formon "Allah".³ Muhammad Zafulla Khan, fama islama ekzegezisto kaj verkisto, en sia antaŭparolo de la ĵus menciita libro uzas "Dio", krom en koranaj citaĵoj, kie li kompreneble uzas la tradukon de Chiussi. La tradukinto en sia biografio pri la profeto Mahometo, "Je la flanko de la profeto", ie skribas "Allah", ie "Dio".⁴

Profesoro Jan Bergman esploris la demandon pri "Allah" aŭ "Gud" (= Dio) en la sveda. Lia konkludo estas, ke ekzistas argumentoj por ambaŭ solvoj. Kiam la traduko de la Korano aperis en la sveda, islamanoj estis kontentaj pri la uzo de *Gud* anstataŭ *Allah*, ĉar tiamaniere oni ne riskas ke iuj kredus, ke islamanoj havas alian dion ol kristanoj. Pro la sama kialo en svedaj lernejoj oni uzas *Gud* en instruado kaj pri judaismo, kaj pri kristanismo, kaj pri islamismo. Uzo de "Dio" kiel traduko por la islama arablingva nocio *Allah* kreas konscion pri la komuna radiko de tiuj ĉi religioj: la interligo inter Dio kaj Abraham.⁵ Parolantoj de la araba kaj la turka cetere nomas Dion per la sama vorto *Allah*, sendepende ĉu ili estas judoj, kristanoj aŭ islamanoj. Svedino, kiu estis turistino en Jerusalemo, rakontis al mi, ke ŝi ege miris, kiam ŝi ekaŭdis kristanajn palestinanojn en preĝejo laŭte preĝi al "Allah".

La demando pri "Dio" aŭ "Allah" do estas teologia kaj kulturhistoria deman-

do. La vortoj estu uzataj de diversaj homoj en diversaj situacioj.

Uzo de "Dio"

"Dio" estu la normala esperanta traduko de la araba vorto *Allah*, sendepende ĉu islama aŭ kristana arablingvano skribis ĝin. La arablingva vorto *Allah* havas ekzakte la saman difinon, kian donas Plena Ilustrita Vortaro (PIV) por "Dio, II. 1: Plej supera, perfekta, eterna k ĉiopova estaĵo, adorata kiel kreinto k gvidanto de la universo."⁶

Uzo de "Allah" (Alaho)

Laŭ islamismo, Dio mem verkis La Noblan Koranon en la klasika araba lingvo, kaj revelaciis parton de ĝi al Mahometo. Laŭ tio estas facile kompreni, kial multaj islamanoj ne volas traduki per alia vorto ol "Allah", kiu estas la memprezento de Dio.

Ankaŭ homoj, kiuj volas atentigi pri la granda diferenco inter islamismo kaj aliaj religioj, pro tute alia kialo – ĉar ili estas malamamikaj al aŭ kritikemaj kontraŭ islamismo – verŝajne uzos la vorton "Allah".

En PIV troviĝas ankaŭ la esperantigita formo "Alaho".⁷ Tiu ĉi esperantigo, kvankam tute korekta kaj laŭfundamenta, ne estas rekomendinda. Ĝi ne konservas la memprezenton de Dio neŝanĝita. Mi neniam vidis islamanon uzi tiun formon en esperanta teksto.

Leif Nordenstorm

¹ Sekelj, Tibor: *Elpafu la sagon*, el la buŝa poezio de la mondo, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1983, pp 15-16

² Sekelj, pp 177-178

³ La Nobla Korano, TK, Kopenhago 1970

⁴ Chiussi, Italo: *Je la Flanko de la Profeto*, TK, Antverpeno 1978

⁵ Bergman, Jan: *ALLAH eller GUD, Reflexioner kring namn, gudsforeställningar, uppenbarelse, översättning och kommunikationssituationer*; en: *Religionsvetenskapliga studier*, Festskrift till Sven S Hartman, Religio 12, Lund 1983.

⁶ Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, p 183

⁷ PIV, p 28

Por komencantoj

Novaj libroj por vorto-konstruantoj

En *La Espero* 5-6/1991, Sten Johansson favore recenzis la du unuajn vorto-konstruajn broŝurojn de Jan Milld. Nun aperis ankoraŭ kelkaj kajeroj en la sama serio. Ili estas tre utilaj por svedoj, kiuj volas ekzerci esperanton. Abundas ekzercoj pri tradukaĵo inter la sveda kaj esperanto.

En la serio nun aperis:

1. Ordbygge, 25 kr; 2. Mer ordbygge, 20 kr; 3. Ännu mer ordbygge 20 kr; 4. Substantiv, 15 kr; 5. Adjektiv, 15 kr; 6. Kunmetaĵoj, 15 kr; 7. Prepositioner, 10 kr; 8. Ord-pyssel. 20 kr. Ankaŭ komencis aperi la gazeteto *La Vortulo*, kiel debatoro.

Mendu pagante la koston al poŝtĝiro 80 73 30-6, Jan Milld. Informas: Jan Milld, Solhemsvägen 21, 137 40 Västerhaninge, tel. 0750-297 34.

Recenzoj

Bunta scienca literaturo

Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius. Volumo 1. Redaktis: Paul Neergaard kaj Christer Kiselman. Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1992. XI + 118 p.

En 1986 fondiĝis la Akademio Comenius kun la celo iniciati, kuraĝigi kaj konsili pri efektivo de sciencaj esplorprojektoj.

Nun aperis la bunta unua volumo de la aktoj de tiu ĉi akademio. En bele presita libro ni trovas dek kvin sciencnivelaĵajn artikolojn pri diversaj fakoj: juridiko, lingvo-historio, filozofio, arkeologio, sociologio, matematiko, astronomio, kibernetiko ktp.

Mi bonvenigas *Aktojn de ISAC*. Ili estas bona kompletigo al la scienca literaturo de esperanto. Kun intereso mi legis ekzemple "La Radikojn de Ĉiuj Sciencoj kaj Artoj" de Stanley Nisbet pri la pedagogia demando ĉu la lernoprocedo aŭ la

La kravato estas kroata!

Dum la 17-a jarcento (1600-talet) en Eŭropo furiozis (*härja*) la tridekjara milito (1618-1648), kiun parto-prenis ankaŭ kroataj soldatoj. Ili venis ĝis Parizo, kiu jam fariĝis fama pro eleganteco.

Kiel parton de siaj uniformoj, kroataj soldatoj tradicie portis aparte binditajn (*bunden*) tukojn ĉirkaŭ la kolo.

Tiu ĉi kroata kutimo tre plaĉis al elegantaj parizanoj. Dum la epoko de reĝo Ludoviko 14-a (*Ludvig XIV*) ili akceptis ĝin, kaj portis tukojn binditajn *a la Croate* (t.e. "kroat-maniere").

Tiu esprimo (*uttryck*) baldaŭ fariĝis radiko de nova franca vorto *cravate*, kiu poste disvastiĝis tra la mondo, kiel la vorto "kravato"; kaj tiel kravato kiel signo de kulturo kaj eleganteco konkeris (*erövra*) la urban vesto-stilon tra la tuta Eŭropo, kaj poste de granda parto de la mondo.

J. Rey
(Prilaborita)

za statistika metodaro" kaj "Moralo pri komunikado". La artikoloj estas sciencnivelaĵaj studoj prezentitaj dum Sammarinaj Universitataj Sesioj en 1989. Ankaŭ tiu ĉi estas bonkvalita verko.

Scienca revuo. Volumo 42. Internacia Scienca Asocio Esperantista. Svislando 1991. 92 + 74 p.

Jam aperis la 42-a volumo de tiu ĉi jam malnova ligilo inter sciencistoj kaj teknikistoj de ĉiuj branĉoj. El la enhavtabelo de tiu ĉi jaro mi povas mencii: "Islanda lingvo-politiko", "Samuel von Pufendorf kiel ekonomikisto", "Mezepokaj ĉinaj metodoj prognozi tertremojn", "La praloĝantoj de Kubo" kaj "Pro la feromonoj".

Ĉiujare aperas du numeroj de la revuo. La preso estas iom modesta; la artikoloj estas tute malsama kompostitaj. La enhavo estas plejparte popularscienca aŭ en facila scienca nivelo.

* * *

Mi mem science aktivis nur pri religihistorio. Mi tamen kun intereso legas popularsciencajn verkojn pri ia ajn fako. En la sveda mi kun ĝojo voras la popularscienca revuon "Illustrerad vetenskap" pri diversaj fakoj; en esperanto mi volonte ĝuas *Sciencan revuon*.

La supre menciitaj aktoj tamen ne estas popularsciencaj, sed sciencnivelaĵaj; sekve mi sukcesas kompreni la enhavon de nur duono de ĉiu aktaro. Tio ĉi laŭ mi estas grava manko, same kiel de multaj aliaj sciencnivelaĵaj periodaĵoj en esperanto. Ĉu Akademio Comenius, ISAE kaj AIS ne povus eldoni kelkajn komunajn pritemajn periodaĵojn, anstataŭ ĉiu sian propran ĉiuteman? Tiel povus kreiĝi pliaj sciencnivelaĵaj revuoj aŭ aktoj apud la nunaj *Simpozio* (filozofio), *Matematiko Translimen*, *Medicina Internacia Revuo*, *Geologio Internacia* k.a. Tiamaniere ĉiu sciencisto povus aĉeti volumojn, kiuj temas pri lia propra kaj parencaj fakoj.

Alia ebleco estas, ke kelkaj volumoj de la aktoj estonte povus temi pri kultursciencoj, aliaj pri matematiko aŭ pri natursciencoj.

Aperas multaj interesaj sciencaj artikoloj en esperanto, sed la serioj estas tro buntaj. Se la serioj estus pli mallarĝaj, la legantoj pli facile trovas artikolojn interesajn kaj uzeblajn en siaj respektivaj fakoj.

Leif Nordenstorm

enhavo estas la plej grava. Se vi estis aŭ intencas iri al la Kanariaj insuloj vi ne prelegu "Lingvo-historian Pritrakton super la Nomoj de la Kanariaj Insuloj". Interesege! "Geografiaj Aspektoj de la Evoluado de Itala Popolo" de Elio Migliorini donas interesajn informojn ekz. pri la diferenco inter la vivo en norda kaj suda Italio.

La verko estas bonkvalita kaj laŭ enhavo, kaj laŭ aspekto.

Aktoj de S U S. Acta sanmarinenses academiae scientiarum internationalis. Volumo 1 (1990). LTV Leuchterturm Verlag. Alsbach 1990. 28 + 12 + 11 + 17 p.

Tiu ĉi volumo konsistas el kvar diversemaj kajeroj: "Enkonduko al la problemoj de programaj-produktado", "Astronomiaj teleskopegoj kaj iliaj celobjektoj", "Ba-

SEJU

SEJU:s styrelse 1992-93

Ordförande:

Kajsa Larsson
Lilla Sällskapetets väg 50, nb
127 61 Skärholmen
tel: 08/97 46 26

Vice ordförande:

Camilla Persson
Fredsgatan 7 C
694 00 Hallsberg
tel: 0582/155 77

Sekreterare o. redaktör:

Malin Söderback
Studiegången 4-212
416 81 Göteborg
tel: 031/25 21 95

Vice sekreterare:

Keiko Snarberg
Björksgatan 31 B
416 52 Göteborg
tel: 031/19 74 87

Kassör:

Gabriella Sandström
c/o Lawton
Hornsgatan 29 C, uppg. B
118 49 Stockholm
tel: 08/640 59 11

Styrelsemedlem:

Åsa Andersson
Kungsvägen 128 B, 1 tr.
352 45 Växjö
tel: 0470/469 48

Styrelsemedlem:

Fredrik Olofsson
Lextorpsvägen 279
461 64 Trollhättan
tel: 0520/711 66

La SEJU-estraro
deziras al ĉiuj
Gajan Kristnaskon
kaj
Feliĉan Novan Jaron!

Nekrologoj

Sven Eriksson

La multjara membro de Esperanto-societo de Uppsala, Sven Eriksson, de ni konata kiel "La magiisto", estis entombigita en Uppsala, la 12-an de junio. Kelkfoje li faris prezentojn en Esperanto. La societion reprezentis Yngve Nilsson kaj Tomas Jansson.

Gustaf Löfqvist

La 17-an de aŭgusto mortis la 98-jara ekslignajisto Gustaf Löfqvist, Visby, iam vigla propagandisto de esperanto en Gotland. Li estis aktiva ankaŭ en la Sveda eklezio kaj pri fotado kaj biciklado. Novan biciklon li aĉetis eĉ 90-jara.


Dags att prenumerera

Att läsa tidningar på esperanto är givande ur många synpunkter. Man tränar sitt språk och man får nyheter från hela världen. På årets lista finns flera nyheter. Priserna är beräknade per den 25 november, p.g.a. den ovissa valutamarknaden kan de komma att ändras. Detta gäller alla, men främst de priser som är märkta med *. Ändringar meddelas i nästkommande nummer av *La Espero*.

Bulgara Esperantisto , Bulgarien	12 nr/år	125 kr*
El Popola Ĉinio , Kina	12 nr/år	175 kr
Esperanta Finnlando , Finland	6 nr/år	60 kr
Eventoj , Ungern (flygpost 260 kr)	24 nr/år	225 kr
Fonto , Brasilien	12 nr/år	135 kr
Heroldo , Italien (flygpost 175 kr)	16 nr/år	150 kr
ICEM , Frankrike	12 nr/år	125 kr
Informoj de EAE , Estland		80 kr
Juna Amiko , Ungern	4 nr/år	60 kr
Kontakto , Nederländerna	6 nr/år	100 kr
Kulturaj Kajeroj , Frankrike	4 nr/år	90 kr
La Espero el Koreio , Sydkorea	6 nr/år	70 kr*
La Jaro , Belgien (flygpost 45 kr)	årskalender	35 kr
La Kancerkliniko , Frankrike	5 nr/år	130 kr
La Letero de l' Akademio , Frankrike	4 nr/år	150 kr
La Ondo , Ryssland	6 nr/år	75 kr
Literatura Foiro , Schweiz	6 nr/år	170 kr
Litova Stelo , Litauen	6 nr/år	80 kr
Monato , Belgien (flygpost 260 kr)	12 nr/år	245 kr*
Monato , 2 år (flygpost 520 kr)		490 kr*
Monato , 3 år (flygpost 780 kr)		735 kr*
Norda Prismo , Finland	4 nr/år	100 kr*
Norvega Esperantisto , Norge	6 nr/år	75 kr
Oomoto , Japan	2 nr/år	75 kr*
Paco , Belgien		85 kr
Ruslanda Esperantisto , Ryssland	12 nr/år	60 kr
Scienca Revuo , Schweiz	2 nr/år	120 kr
Vjetnamio , Vietnam	4 nr/år	100 kr

Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på **pg 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundets specialkonto, Hörby**. Ange vilka tidningar som avses. Förfrågningar angående tidningsprenumerationer kan göras hos: **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52**.

Krucvortenigmo



Horizontale:

- | | | | |
|---|--------------------------|----|-------------------------|
| 1 | Renkontiĝo por pritrakto | 6 | Trudherb' – 1067 metroj |
| 2 | Aŭdorgano – Rabobest' | 7 | Iomete malpli ol sepona |
| 3 | Ridaĉis – Ne ŝi | 8 | Timon – En okazo |
| 4 | Malĝojiga – Fervojlini' | 9 | Reklamgas' – Maniero |
| 5 | Membro – Dama | 10 | Haŭtĝeno – Kurb' |

Vertikale:

- | | |
|---|------------------------------------|
| A | Infarkta |
| B | Konstelacio – Ankaŭ ne |
| C | Mortinto kaŭzas tion |
| Ĉ | Plata bakaj' – Scie |
| D | Longperioda – Krude manĝi (radiko) |
| E | Klopodos |
| F | Li kondukas aŭton eksteren |
| G | Maljes – Homspec' – Prapatr' |
| Ĝ | Mezurunua – Paroladeta |
| H | Ŝtono por ornamaĵo – Di' de ventoj |

Kompilis: **Lennart Persson**

Solvo de la krucvortenigmo en La Espero n-ro 4/1992

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	S	A	K	R	A	M	E	N	T	A
2	O	R	A	■	G	A	L	E	A	S
3	C	A	R	O	N	■	I	G	L	O
4	I	B	E	R	O	■	R	A	P	■
5	A	■	T	A	S	M	A	N	O	J
6	L	U	A	N	T	O	■	T	■	U
7	I	N	■	Ĝ	I	R	O	O	N	D
8	S	I	R	O	K	O	N	■	I	E
9	T	A	O	■	A	N	K	R	A	J
10	O	N	D	O	N	■	L	E	N	O

Till 31 dec 1992

360

kronor

Ordbok Svenska-Esperanto.

Ca 500 sidor, inbunden. Med de nyaste orden. Priset inkludrar moms och porto.

Postgiro 578-5,
Esperantoförlaget

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö

Esperantoförbundet, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm

Redan nu kan ni anmäla er till

Kongressen i Valencia 24-31 juli 1993.

Kongressavgiften i svenska kronor:

Kategori	till 911231	från 920101	från 920401
Direktmedlem i UEA (ej MG)	820	1025	1225
Ej direkt medlem i UEA	1025	1280	1525
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1993-01-01), direktmedlem i UEA	420	520	620
Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är direkt medlem i UEA	620	770	920

Avgifterna kan komma att justeras uppåt i händelse av kursändring. Detta meddelas i så fall i nästkommande nummer av La Espero. Inför kongressen i Valencia finns även möjlighet att förhandsbeställa hotellrum. Blankett för detta kan liksom anmälningsblankett för kongressen beställas hos: **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.** Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till: **pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby.** Ange på talongen vad som avses.

Eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas.

[PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L. L. ZAMENHOF, KOMPOSITITA PER LA LITERTIPO AD HOC]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj.
Pli ol tri mil malsamaj litertipoj je dispono.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 Tyresö · Tel. 08-742 83 36 · Fakso 08-712 39 93

VASTAJ SPACOJ

Mi preferas vastajn spacojn kaj domon ĉe la mar'.
Tie ĉerpas mi trankvilon dum parto de la jar'.
Mi preferas vastajn spacojn, kie kuras freŝa vent'.
kaj kanto de alaŭdoj parolas al la sent'.
Mi faras mian brandon mem, kaj spicas ĝin per propra man', kaj trinkas ĝin kun granda ĝu' al sala fiŝ' kaj pan'.
Mi preferas vastajn spacojn kaj domon ĉe la mar'.

Mi preferas la liberon de paca vivmedi'.
La ŝtelisto kaj la avarul' nun restu for de mi.
Mi preferas la tagiĝon kaj lumiĝon de l' kampar'.
La kokoj vokas en distanc', kaj foras la najbar'.
Sed tamen ne pli for ol ke, en nokta hor' de plen-silent', atingu min festena rid' sub stela firmament'.
Mi preferas la liberon de paca vivmedi'.

Mi preferas maron ondan kaj sonojn de mev-kri'.
En la konkoj sur la sablo resonas melodi'.
La memklaro kaj simpleco nun regas sen problem', ĉar jesas "jes" kaj neas "ne" kaj mutas la dubem';
kaj floro-kronon portas mi, por lasi ĝin sur iu rok', responde al la run-mesag' de fora pra-epok'.
Mi preferas maron ondan kaj sonojn de mev-kri'.

Mi preferas vastajn spacojn kaj domon ĉe la mar'.

Teksto k melodio: **Ulf Lundell**
Elsvedigo: **Per Aarne Fritzon**